Matena Laŭdo, 7a dimanĉo de Pasko

dimanĉon, 20an de majo 2007a

Himno Adoru 343 aŭ 344

Psa 93 Adoru 719

Laŭdkanto de la tri junuloj Adoru 091.7-9

Psa 148

Antifono: Laŭdo en la nomo de la Sinjoro, halleluja, en la ĉielo kaj sur la tero, halleluja!

Gloru la Eternulon el la ĉielo,
Gloru Lin en la alto.

Gloru Lin, ĉiuj Liaj anĝeloj;
Gloru Lin, ĉiuj Liaj militistaroj.

Gloru Lin, suno kaj luno;
Gloru Lin, ĉiuj lumaj steloj.

Gloru Lin, plej supraj ĉieloj,
Kaj la akvo, kiu estas super la ĉielo.

Ili gloru la nomon de la Eternulo;
Ĉar Li ordonis, kaj ili kreiĝis.

Kaj Li starigis ilin por ĉiam, por eterne;
Li donis leĝon, kiun ili ne malobeos.

Gloru la Eternulon el la tero,
Marmonstroj kaj ĉiuj abismoj;

Fulmo kaj hajlo, neĝo kaj nebulo,
Ventego, kiu plenumas Lian vorton;

Montoj kaj ĉiuj montetoj,
Fruktoportaj arboj kaj ĉiuj cedroj;

Bestoj kaj ĉiaj brutoj,
Rampaĵoj kaj flugilaj birdoj;

Reĝoj de la tero kaj ĉiuj popoloj,
Princoj kaj ĉiuj juĝantoj sur la tero;

Junuloj kaj junulinoj,
Maljunuloj kaj knaboj.

Ili gloru la nomon de la Eternulo,
Ĉar sole Lia nomo estas alta,

Lia majesto estas sur la tero kaj en la ĉielo.
Kaj Li altigis la kornon de Sia popolo,
La gloron de ĉiuj Liaj fideluloj, * De la filoj de Izrael, Lia plej proksima popolo.

Gloro...

Legaĵo (Ago 10, 40-43)

Lin Dio levis en la tria tago, kaj donis, ke li estu videbla, ne al la tuta popolo, sed al atestantoj, kiuj estis elektitaj antaŭe de Dio, al ni, kiuj manĝis kaj trinkis kun li post lia releviĝo el la mortintoj. Kaj li ordonis al ni prediki al la popolo, kaj atesti, ke li estas la difinito de Dio, por esti la juĝisto de la vivantoj kaj de la mortintoj. Pri li ĉiuj profetoj atestas, ke per lia nomo ĉiu kredanta al li ricevos pardonadon de pekoj.

Responsorio Adoru 091.15

Laŭdkanto de Zeĥarja Adoru 091.16 - 18

Porpetoj

Patro nia

Resuma preĝo
Ĉiopova Dio, ni kredas, ke nia Savanto estas ĉe via dekstra flanko en sia gloro. Elaŭdu niajn preĝojn kaj faru, ke ni sentu lian ĉeeston inter ni ĝis la fino de la mondo, laŭ lia promeso. Per Kristo...

Beno Adoru 095.22

Unua Vespro, 7a dimanĉo de Pasko

sabaton, 19an de majo 2007a

Himno Adoru 343 aŭ 344

Psa 113 Adoru 055.5

Psa 116

Antifono: Sinjoro, vi cedigis miajn katenojn, mi oferdonos al vi la laŭdoferon, haleluja!

Kun kredo mi diris:
Mi estas tre afliktita.

Mi diris en mia konfuziĝo:
Ĉiu homo mensogas.

Kion mi redonu al la Sinjoro
Por ĉiuj Liaj bonfaroj al mi?

Mi levos la pokalon de savo,
Kaj mi vokos la nomon de la Sinjoro.

Miajn promesojn al la Sinjoro mi plenumos
Antaŭ Lia tuta popolo.

Grandvalora en la okuloj de la Sinjoro
Estas la morto de Liaj fideluloj.

Ho Sinjoro, mi ja estas Via sklavo, +
Mi estas Via sklavo, filo de Via sklavino;
Vi disigis miajn ligilojn.

Al Vi mi oferdonos dankan oferon,
Kaj la nomon de la Sinjoro mi vokos.

Miajn promesojn al la Sinjoro mi plenumos
Antaŭ Lia tuta popolo,

En la kortoj de la domo de la Sinjoro,
Interne de vi, ho Jerusalem.

Gloro....

Flp 2

Antifono: Pere de la suferoj de sia Pasiono, la Filo de Dio lernis la obeon. Por ĉiuj kiuj obeas al Li, li estas la savofonto, haleluja!

Kristo Jesuo, estante en la formo de Dio, * ne rigardis kiel ŝatindaĵon la egalecon kun Dio

sed sin malplenigis, *
alprenante la formon de sklavo,
fariĝante laŭ la bildo de homoj; +
kaj troviĝinte laŭfigure kiel homo, * li sin humiligis

kaj fariĝis obeema ĝis morto, *
eĉ ĝis la morto per kruco.

Pro tio do Dio tre alte superigis lin, *
kaj donis al li nomon,
kiu estas super ĉia nomo,

por ke en la nomo de Jesuo
kliniĝu ĉiu genuo, *
de enĉieluloj kaj surteruloj kaj subteruloj,

kaj ĉiu lango konfesu, ke
Jesuo Kristo estas Sinjoro,
al la gloro de Dio, la Patro.

Legaĵo (1Pet 2, 9-10)

Vi estas raso elektita, pastraro reĝa, nacio sankta, popolo Diposedata, por ke vi proklamu la gloron de Tiu, kiu vokis vin el mallumo en Sian lumon mirindan; kiuj iam estis nepopolo, sed nun estas popolo de Dio; antaŭe nekompatitoj, sed nun kompatitoj.

Responsorio Adoru 095.15

Laŭdkanto de Maria Adoru 095.16 - 17

Porpetoj Adoru 095. 20

Patro nia

Resuma preĝo
Ĉiopova Dio, ni kredas, ke nia Savanto estas ĉe via dekstra flanko en sia gloro. Elaŭdu niajn preĝojn kaj faru, ke ni sentu lian ĉeeston inter ni ĝis la fino de la mondo, laŭ lia promeso. Per Kristo...

Beno Adoru 095.21